



Labortago kaj turismo en Seto

Bela aŭtuna vetero, konstruiga laboro, interesaj vizitoj, jen la tri karakterizoj de nia lasta federacia kunveno en Sète la 24-an de oktobro.

La gastama "Centre Familial du Lazaret" estas, miaopinie, taŭga kunvenejo por pliaj tiaj kunvenoj.

Ĉeestis pli ol dudeko da gesamideanoj inter kiuj troviĝis ok gekomitatanoj. Petis senkulpigon S-inoj VOLPELIERE, AUTHIER kaj F-ino TERRAL.

Jen konciza protokolo de la laborkunsido:

Financa situacio: en tiu ĉi kajero de SFS troviĝas raporteto de S-ro DELIGNE.

Novaj kotizoj por U.F.E.: Instrukcioj ankoraŭ ne alvenis de U.F.E sed, laŭ la protokolo de la lasta konsilia kunsido de U.F.E. la du ĉefaj kotiztarifoj estos la jenaj:

- a) aktiva membro de U.F.E. kun abono al "Franca Esperantisto" 70,00 frs.
- b) simpla membro de U.F.E. (kaj verŝajne ankaŭ por la kategorio "amis de l'espéranto" ! ?) 17,00 frs.

Estus bone, ke la grupoj ricevu kvanteton da vendotaj kartoj "amis de l'espéranto", kvazaŭ loteribiletaro por povi pli facile kaj efike ilin disvendi.

Nia federacia kasisto, S-ro DELIGNE, refoje alvokas la kasistojn de la grupoj, ke la kotizojn ili transsendu al li, laŭeble en unu sola fojo. Tio faciligos lian laboron kaj tiun de U.F.E. kaj evitos elspezojn por servo kiu lasas vere tre malaltan sumeton en la federacia kaso.

"Sudfrancia Stelo": La bone konataj cirkonstancoj faras ke, en 1977, la jara abonkosto altiĝos ĝis 7,00 frs. Krom tio nur 2 kajeroj de SFS enhavos amuzajojn kaj du ne, sed al 1 el tiuj 2 estos aldonita la ĉiujara "Espéranto Actualités" propagandcele ĉar ĝi estas en la franca lingvo.

Reklamoj en "Franca Esperantisto": Sekve de letero-cirkulero de Hervé GONIN, prezidanto de U.F.E. kaj redaktoro de F.E., alvoko estas lanĉita al ĉiuj bonvolemluloj por provo kolekti pagitajn reklamojn por F.E. La plibonigo de F.E. esence dependas de la sukceso de tiu ĉi kampanjo.

Federacia Komitato: Ni kore bonvenigas du pliajn komitatanojn: S-ron COQUIN el Ginetas (apud Narbonne) kaj S-ron ENSUQUE el Montpellier.

Esperantista solidareco: 100,00 frs. estos senditaj, pere de la grupo de Lyon, al la familio de Marc BUDIMIR, konsiliano de U.F.E. kiu tragike mortis pro trafikakcidento dum la Universala Kongreso en Ateno.

Aŭtomobilista Esperanto-Klubo: Tute simbola monsumo ebligas la dumvivan aliĝon al tiu grava entrepreno kies celo estas oficialigi Esperanton. La ĝenerala sekretario estas S-ro J. GUILLAUME, 66, de Grasse Village - 78810 Feucherolles. D-ino VIERNE sin proponis por kolekti la aliĝojn en la sino de nia federacio.

D-ro SALAN raportetis pri la kontentiga disvendo de sia libro "La nuda vero" (aĉetebla pere de la libro-servo de U.E.A. kaj U.F.E. aŭ ĉe la aŭtoro 19, rue Pradier - Nimes). Notindas, ke ĉiufoje kiam li vendas ekzemplerojn de sia libro en la kadro de federacia evento, li lasas trionon de la vendsumo por la federacia kaso.

D-ro SALAN krome konfirmis, ke li jam fintradukis "La morto estas mia metio" de Robert MERLE - vidi la lastan numeron de S.F.S. -

"Numismatique & Change": Post la grava filatelista revuo "Le Monde des Philatélistes" la same grava "Numimastique & Change", pri numimastiko, havas ĉiumonatan konstantan kronikon en Esperanto verkitan de S-ro DELCOURT el Tourcoing, fakdelegito de U.E.A. pri numismatiko. Tiuj paŝoj al la iom post ioma integriĝo de Esperanto en neesperantistajn mediojn estas salutindaj.

Pri N & C pliajn informojn bonvole donos la protokolinto.

Federacia kongreso 1977: Ĉar la venontjara jarkongreso de U.F.E. okazos en Grenoblo de la 27-a ĝis la 31-a de majo (Pentekoste) nia federacia kongreso okazos en Nimes la 7-an kaj 8-an de majo.

Post la komuna tagmanĝo ni ĝuis tre agrablajn vizitojn: panoraman alrigardon super la haveno, halton ĉe la fama "martombejo" kaj aparte ĉe la tombo de Paul VALERY.

Ni havis la bonŝancon havi inter ni novan kaj tre afablan samideanon, S-ron CAYROL, havenpiloto kaj vic-prezidanto de la asocio por la savado de surmarendanĝerigitoj. Li detale eksplikis al ni la funkciadon de la boato kaj de la savistaĉmento. Ankaŭ li parolis pri la renkontitaj malhelpoj propraj al la homgrupoj, finance apenaŭ helpatj, kiu altruisme, abnegacie, pasie kaj ofte nedankitaj, sin metas je ĉies dispono. Ĉu ne pro tio S-ro CAYROL estas ankaŭ esperantisto ! ? Ĉiukaze ni sincere dankas lin kaj la aranĝintojn de la evento.
(protokolis Jean AMOUROUX - 1, rue de Sorède - 66000 - Perpignan).

Prelegoj de S-ro LLECH-WALTER

La 28-an de oktobro LLECH-WALTER, delegito de U.F.E. en Perpignan, prelegis en Manresa (Hispanujo) pri la Rusiljonaj poetoj, en kataluna lingvo.


Li bedaŭris tamen, ke ne estas delegito de U.E.A. Tamen loĝas en la urbo bonaj esperantistoj: TUSET, SAUMELL kaj nia poetino Lola ESTRADA kaj aliaj certe.

La 29-an de la sama monato li vizitis la esperantistaron de Sabadell (proksime de Manresa) kaj konstatis kun ĝojo, ke funkcias semajne 4 kursoj kun 60 gelernantoj.

Kun ĝojo LLECH-WALTER revidis Samideaninon CRIACH kaj samideanojn PUIG, LLUSERA kaj Salvador ARAGAY, ĉefredaktoro de "Boletín" la revuo de Hispana-Esperanto-Federacio.



* ANGULO DE LA KASISTO *



Karaj geamikoj,

Jen la nova tabelo de la kotizoj por la jaro 1977-a:

U. F. E.

Jara abono Sud-Franca Stelo	7.00
Membre adhérent	17,00
Membre titulaire (reçoit Franca Esperantisto)	70,00
Membre donateur - d° -	105,00
Membre bienfaiteur - d° -	175,00
Membre titulaire à vie. Cotisation unique	1.400,00
Membre donateur à vie - d° -	2.100,00
Membre bienfaiteur à vie - d° -	3.500,00

U.F.E. + Fakoj

Fakoj estas: G.E.E. Esperantistes du cops enseignant, en activité ou retraités.
J.E.F.O. Junulara esperantista franca organizo.

Membre adhérent	17.00
- d° - + membre de JEFO de moins de 22 ans	51,00
Membre titulaire (reçoit Franca Esperantisto)	70,00
Membre donateur - d° -	105,00
Membre bienfaiteur - d° -	175,00
Membre titulaire à vie. Cotisation unique	1.400,00
Membre donateur à vie. - d° -	2.100,00
Membre bienfaiteur à vie - d° -	3.500,00

U.E.A.

Membres jusqu'à 25 ans inclus (Jarlibro + Kontakto)	37,00
- d° - (Jarlibro + Kontakto + Esperanto)	92,00
Membres de plus de 25 ans (avec Jarlibro)	37,00
Membres de plus de 25 ans (avec Jarlibro + Esperanto)	92,00
Membres de la Société ZAMENHOF. Supplément aux cotisations ci-dessus .	184,00
Abonnement seul à ESPERANTO	55,00
Membres à vie (cotisation unique)	2.300,00

Kiel kutime, mi petas niajn afablajn grupajn kolegojn sendi la kotizojn, tiel kiel eble, per unu sendo, eĉ se por tion fari, ili devos iomete prokrasti la sendojn.

Amikaĵojn al ĉiuj, sed mi petas ne pafu al la kasisto, ĉar mi ne responsas pri tiuj kotizoj.

LA KULTURA VALORO DE ESPERANTO

D-ro ZAMENHOF dediĉis al la Homaro ĉiun liberan minuton de sia vivo, multe da amo kaj la plej genian lingvan perilon, kiu alproksimigas la korojn surbaze de "neŭtrala lingva fundamento".

Tuj post la apero de Esperanto (en 1977 ĝi estos 90 jaraĝa), ZAMENHOF konsciis, ke necesas doni animon al ĝi sub formo ankaŭ de kultura signifo por ke ĝi povu integriĝi kiel normala sociala fakto.

Jam de la komenco li multege verkis kaj tradukis, verse kaj proze. Ankaŭ niaj pioniroj stile sin trejniis verkante kaj tradukante samtempe, tiel pliriĉigante la lingvan evoluon de Esperanto kaj ĝian aplikon sur la kampo de la praktika uzo.

Ne utilas emfazi la nunan plenan integriĝon de Esperanto kiel kultura decidiga elemento. Ja kiu legas nian internacian Esperanto-gazetaron scias pri la nombro de la ĉiumonataj eldonoj tuŝantaj la plej diversajn kaj eĉ kompleksajn fakojn, nivelojn kaj interesojn.

Kiel konate la plejparto de la tutmondaj ĉefverkoj estas tradukitaj en Esperanton. Ankaŭ sciante estas, ke abundas originalaj verkoj en Esperanto kaj ke kelkaj estas tradukitaj alilingven el Esperanto. Sed pli atentinde estas ke homoj, kiuj majstre pliriĉigas nian originalan literaturon, preterlasas originale verki en sian patran lingvon. Ĉu tio ne estas nobelsigno de la kultura signifo de Esperanto?

Rondoj de elstaraj lingvistoj pli kaj pli studas, je la plej alta nivelo, la lingvistikan valoron de Esperanto.

Tutmonda kaj bedaŭrinda fenomeno estas, ke la homoj ne multe legas. Ankaŭ la esperantistoj ne eskapas el tio kvankam, kaj tio estas plia avantaĝo de Esperanto, ili ofte legas pri temoj pro la nura fakto, ke skribitaj en Esperanto, dum ili ne estus tion faranta se la legaĵo estus en ilia patra lingvo!

Ĉiujare, en decembro, la esperantistoj kutimas festi la "ZAMENHOF-tagon", kiu estas ankaŭ nomata "tago de la Esperanto-libro". Je tiu okazo ĉiu esperantisto devus ankaŭ partopreni per simbola aĉeto de almenaŭ unu ero el la tre riĉa kaj eklektika Esperanto-verkaro.

Jean AMOUROUX.

nimes

ATESTO PRI LERNADO

Du lernantinoj de la Esperanto-kurso de S-ino VOLPELIERE, sukcesis tre bone la ateston (ekzamenojn) pri elementa lernado. Pli poste S-ino MOUNIER estis menciita.

F-ino COULOMB, ĉeestis seminarian konferencon dum julio en Gresillon kaj poste veturis al Pollando por partopreni la kongreson de RIDEF.

Nuntempe ili diligente vizitadas ĉe nia nova sidejo la Zagradan kurson.

KORESPONDI DEZIRAS

Kiu deziras korespondi kun Orient-germano, pri historio, arto, naturo aŭ intersaŝanĝi bildkartojn aŭ poŝmarkojn, skribu al :

S-ro Rikardo SCHULZ

Otto Erick str. 5

1502 BABELSBERG 2 (Rép. Dém. Allemande)

K R U C V O R T O J

Horizontale



- 1- Amata rakonto de Andersen (du vortoj) -R-
- 2- Ĝuste konforma al la cirkonstancoj - Parteto
- 3- Altira - Ŝnurego
- 4- Moviĝado - Artikolo - Abomena
- 5- Ĝi povas esti teatra, fervoja aŭ de loterio -
Longa piedo de marĉa birdo -R-
- 6- Dekpieda krustulo - Participe finaĵo
- 7- Fruktoj el kiuj oni distilas bongustan brandon
- 8- Superega, bonega - Sankta bildo -
Tiu de KOLUMBO estas fama - R-
- 9- Vulkano - Maljuna -R- Tre -R-
- 10- statuo honorata perkulto - Malmola blanka substanco
- 11- Prefikso - Ĉiuj apartaj ŝanĝoj de lokoj -
Birdo kies merlo estas specio -R-
- 12- Originala novelaro de Marjorie BOULTON -
Pola romano de E. ORZESKO.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2									■			
3				■							■	
4						■			■			
5							■					
6	■								■			■
7	■											■
8				■							■	
9						■				■		
10		■							■			
11			■						■			
12							■					

Vertikale




- 1- Senkompara studlibro pri la ideoj kaj idealoj de oriento (4 vortoj)
- 2- Honori kiel diaĵon - Participe finaĵo - Fonetike - kortobirdo -
- 3- Frenzo pro memekzalto (R) -
- 4- Waringhien estas la prezidanto de la esperanta -R- Nomo de virino
- 5- En vero - Akva mamulo -R- Metalo
- 6- Esti neokupita -R- Neklaraĵ aŭ dusecaĵ respondoj de la dioj -
- 7- Ano de Eŭropa lando -R- Antikvaj grekaj moheretoj -
- 8- Ŝtelas - Sufikso
- 9- Teksajo - Malgranda
- 10- Nova adepto - Malmola blanka substanco -R-
- 11- Sufikso - Sufikso - Jahurto -R-
- 12- satira teatraĵo de Marcel Pagnol - Tia estas la raketo de Jean Forge

* - (R) nur radiko

* - La solvo aperos en la venonta numero

N	E	E	S	P	R	I	M	E	B	L	A
E	S	K	A	L	O	■	A	K	R	I	D
E	K	■	L	E	M	A	N	■	L	U	N
S	A	R	A	B	A	N	D	O	■	O	L
T	R	E	M	I	■	T	I	L	O	■	E
I	O	■	A	S	■	I	B	E	R	■	S
N	■	E	N	C	I	K	L	I	K	■	K
G	A	R	D	I	■	V	O	■	I	D	A
E	K	A	R	T	■	A	■	E	D	E	N
B	E	T	O	■	O	■	A	T	E	N	T
L	N	U	■	A	N	T	I	■	■	T	O
A	■	M	A	N	D	A	R	I	N	O	J


 Solvo
 de la krucvortoj
 aperintaj en la N. 58


5 minutoj de paŭzo



Ni forgesis veki la patrinon...



SEN VORTOJ



Kontraŭuloj aukaŭ sur benko



SEN VORTOJ



No, nein, non, niet, NE, !...



Ili asertas esti ĝemelaj fratoj

R. FROUS

NI PERFEKTIĜU EN ESPERANTO : Pri "absoluta participo".

Prekaŭ ĉiuj eraroj, kiujn oni faras fontas en nia nacia lingvo.

Tipa ekzemplo estas la "absoluta participo", kiu estas ege ofta, eĉ belstila, en la franca, kaj kiu TUTE NE EKZISTAS en Esperanto.

Ekz: Le père mort, les fils vous retournent le champ.

Le jour tombant, il rentrait à la maison.

L'averse ayant cessé, nous nous séparâmes.

Nous ne pouvions avancer, des brindilles jonchant le sol.

Tiuj participoj havas neniun rilaton kun la subjekto de la ĉefa propozicio. Ili estas "absolutaj". Oni ne povas traduki tiujn esprimojn. Nepre necesas modifi ilin: dès que le père fut mort, ... au Après la mort du père...

parce que le jour tombait, au A la tombée du jour...

do: fari el tiuj esprimoj normalajn propoziciojn au prepozitivojn (prepozicio + substantivo).

Jen ekzemplo eltirita el la Biblio: (traduko de LOISY):

"Or l'an quinziesme du règne de TIBERE, PONCE PILATE étant gouverneur de Judée, la parole de Dieu fut adressée à Jean..." (Luc III, /1,2).

Sama ekzemplo, en la traduko de SEGOND:

"Or l'an quinziesme du règne de Tibère, lorsque Ponce Pilate était gouverneur...

En Esperanto: "En la 15-a jaro de la regado de Tiberio Cezaro, kiam Pontio Pilato estis provincestro de Judujo, venis la vorto de Dio".

(vidu: "Plena Gramatiko" n° 187 3-a eldono).

Konsekvence: "le repas coûtera 25 f., vin compris" tradukiĝos:


"la manĝo kostos 25f., inkluzive vinon",

la manĝo kostos 25f., kune kun vino.

La prezo de la manĝo, kiu entenas ankaŭ tiun de vino, estos 25f.

sed ne: vino entenata, nek: vino entenate.

LENTAIGNE.




NASKIĜO

La pasintan 21-an de junio 1976 estis enmondiginta Mikaelo, per gajgi la hejmon de viaj respondeculoj de S. F. S. Sylvette kaj Roberto Frus.

La etulo, peris preskaŭ 4 Kg. da esperantisteco, forta kaj sana.

Oni prezentas tiun bebon al esperantistaro, dezirante, ke sub bonaj aŭspicioj, li partoprenos la internacian sukceson de nia lingvo.

Jen interesa rezolucio proponata, por asekuri efikan estontecon al nia filologia movado!



Okaze de Kristnasko kaj Jarsanĝo
ni esprimas niajn sincerajn Bondezirojn
al ĉiuj niaj Legantoj kaj Simpatiantoj.

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal : 4^{me} Trimestre 1976

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes